



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 2

Marto/Aprilo 1964

BRUSELO GASTIGOS LA IFEF-KONGRESON

De la 9a ĝis 15a de majo 1964 okazos la 16a IFEF-kongreso en Bruselo, la metropolo de Belgio. LKK atendas multnombrajn vizitontajn al tiu grandskala manifestacio. Bruselo estas vaste konata ekonomikcentro kaj unu el la plej belaj urboj en la mondo.

Kun nur 31000 km² Belgio apartenas al la plej malgrandaj landoj en Eŭropo. Sed la popolo atingis la konsiderindan nombron de 8705000 enloĝantoj. Unu miliono loĝas sole en Bruselo.



La Centra Stacidomo kie okazos la 16a IFEF-kongreso.

Antikva urbo de komerco kaj arto

En la sepa jarcento konstruigis la episkopo de Cambria kapelon sur malgranda insulo en la rivero Seune, alftua rivero de Escout (Schelde). Ĉirkaŭ la kapelo elkreskis urbeto, kiu nomiĝis Bruselle (broec = marĉo, sele = konstruaĵo). Ĝi situis apud la grava komercvojo Köln — Brügge kaj forte kreskis en la 12a jarcento. Dum tiu epoko la dukoj de Brabant faris la urbon kiel sian rezidejon.

Same kiel multaj aliaj antikvaj urboj, ankaŭ Bruselo suferis pro teruraj bruloj, kaj ĝi ankaŭ sentis la peston kaj kelkajn okupaciojn. Sed Bruselo transvivis ĉiajn mizerojn. Dum la 17a jarcento ĝi estis unu el la grandurboj de Eŭropo, en kiu floris la arto plej multe. Tie vivis ekzemple la fama pentristo Rubens.

La plej malnova parto de Bruselo limiĝis je bulvaroj. Kompreneble tiuj limoj, antaŭe remparoj, jam delonge estas trapasitaj. Nuntempe Bruselo estas forte frekventita trafikcentro kaj sidejo de la Komuna Eŭropa Merkato. Tie sinsekvas multnombraj konferencoj. Tie ankaŭ havas lokon la grandaj internaciaj foiroj, kiuj altiras ĉiujare pli ol unu milionon da vizitantoj. Sed la fameco havas siajn radikojn jam en la mezepoko. La konstruaĵoj estas memoraĵoj pri la glora periodo de la pasinteco. Abundaj estas la vera arto kaj arkitekturo el tiu epoko. Sed Bruselo estas samtempe moderna metropolo: gotikaj preĝejoj kaj nubskrapuloj elstaras unu apud la alia en paca kunestado. Mondkonata ĝi fariĝis en 1958 per la mondekspozicio.

Kongresanoj bonvenaj

La multnombraj vizitantoj, ankaŭ la kongresanoj de la venonta IFEF-kongreso, trovas ĉie kontentiĝon de siaj atentoj. Multaj hoteloj kaj restoracioj de ĉiu kategorio akceptas afable siajn gastojn. La belga manĝaĵo estas tre bone preparita kaj similas multe al la franca, sed ĝi havas siajn proprajn specialaĵojn. Por la matenmanĝo oni rekomendas la specialajn belgajn bulkojn, kiuj nomiĝas Pistoles. Por la tagmanĝo la gasto elektu ekz. Waterzooi (speco de ragnog preparita el kokinviando anstataŭ el ordinara viando), Anguilles au vert, Choelsels au madere, Rabbit cooked in beer, Moules et frites ktp.

Tipe belga estas ankaŭ la delikataj pampelmoj de la plantovarmejoj, Cramique (speco de kuko preparita el lakto, ovo kaj sekvinberoj). La nacia trinkaĵo estas biero, sed la plej bonaj vinoj de Francio kaj Germanio estas aĉeteblaj ĉie en Belgio. La kutima trinkmono estas 15%.

Al la variaj interesoj pri kulturo kaj distro servas krom la kinejoj multaj teatroj, koncertoj, kabaretoj kaj amuzejoj, en kiuj la prezentado ordinare komenciĝas vespere je la dudeka horo.

Amase da vendejoj

En la vendejoj de Bruselo estas haveblaj varoj el la tuta mondo. Kiu ŝatas memoraĵojn en formo de belgaj manlaboraĵoj, rigardu la puntojn, kuprovarojn, diamantojn, ĉaspafilojn kaj similajn.

Ekzistas du komercaj kvartaloj, unu en la plej supra parto de la urbo, de Porte Namur al Porte Louise, la alia en la plej malsupra parto, inter Place Rogier, la borso kaj Rue Neuve, kiu cetere estas la plej vigla strato. Granda florfoiro troviĝas sur Grand Place, foiro de jam uzitaj objektoj sur Place du Jeu de Belle, kaj sur Place du Grand Sablon estas dimanĉe foiro de antikvaĵoj.

La grandaj vendejoj kaj magazenoj estas malfermitaj de la 9a ĝis 18a horo ĉiutage escepte dimanĉe. Aliaj vendejoj estas malfermitaj ordinare de la 9a ĝis 12a kaj de la 14a ĝis 19a horo ĉiutage. Kelkaj povas esti malfermitaj ankaŭ dimanĉe.

Fervoja trafiko tute modernigita

LKK elektis kiel kongresejon la centran stacidomon. Ĝi situas tre favore en la mezo de la urbo kaj estas moderna konstruaĵo el la jaro 1952. Estas interese rigardi la historion de la bruselaj stacidomoj. Bruselo havis antaŭe du gravajn kapstaciojn: Bruselo — Norda kaj Bruselo — Suda ligita per tre longa ĉirkaŭa linio. En la jaro 1856 la brusela komunkonsilantaro elparolis la deziron de rekta fervoja linio inter la norda kaj suda stacioj. La belga parlamento faris la saman en la jaro 1865. Nur en 1903 leĝa decido aperis pri tiu temo, kaj en 1911 la laboroj komenciĝis. Per la unua mondmilito la daŭrigo de la tuta laboro fariĝis duba. En 1935 oni reprenis la laboron, kiu denove estis interrompata per la dua mondmilito. Sed tuj en 1945 la laboro estis daŭrigata per ĉiuj fortoj kaj fine, la 4an de oktobro 1952, la belga reĝo inaŭguris la novan stacidomon.

La longeco de la interligo estas 3,6 km, el kiuj 2 km situas en tunelo sub la centra parto de la urbo. En la mezo de la tunelo oni konstruis tute novan stacidomon: Bruselo — centra stacidomo, kies peronoj do ĉiuj situas subtere. Ĝi havas tri insulperonojn, el kiuj unu nordflanke estas dividita en du partojn de mallonge senlira trako favore al la trajnservo por la flughaveno Melsbroek. Cetere la trajnoj ne finas aŭ komencas siajn veturojn en tiu ĉi stacidomo. Per rulantaj ŝtuparoj la vojaĝantoj atingas de la peronoj la grandan halon sur la nivelo de la strato. La granda forveturhalo kun la giĉetoj estas belega; ankaŭ eleganta restoracio estas sur tiu ĉi etaĝo. La granda konstruaĵo entenas multajn oficejojn de komercaj entreprenoj. I. a. oni trovas ankaŭ la finstacion de la belga flugasocio SABENA. La flugmaŝinpasajeroj atingas per lifto rekte la forveturperonon de la trajno al la flughaveno Melsbroek.

Ĝenerale ne estas tre konvene okazigi IFEF-kongresojn en grandurbo. Sed ŝajnas, ke la promesita subteno flanko de la fervojaj kaj urbaj instancoj multe helpos. Certe la kongresanojn atendos multpromesaj tagoj. Ni ne forgesu, ke la

IFEF-kongreso estu unuavice faka, ne distra aranĝo. GEFA atendas de siaj membroj aktivan partoprenon al la kunvenoj kun faka karaktero. (Kompil. de W. B. laŭ artikoloj en la organoj de la danaj kaj nederlandaj kolegoj).

Aranĝoj en Esperantujo

Aprilo

La renesanca kastelo Schwöbber apud Hameln gastigos de la 31a de marto ĝis la 6a de aprilo interesulojn de la Lingvo Internacia. Tri kursoj (komencantoj, progresintoj, ekzamenotoj) estas gvidataj de spertaj instruistoj. Kostoj: 7,— DM potage. Restado en unu- kaj dultitaj ĉambroj. Aliĝo per: s-ro Heinrich Müller, 3 Hannover, Mommensenstraße 5.

Majo

La Germana Esperanto-Asoocio okazigos sian tradician jarkunvenon pentekoston (16. - 18. 5.) en Soltau (Han.) En la LKK troviĝas du GEFA-anoj. Dukolorajn glumarkojn (prezo 1,— DM) vendas kaj informojn donas: s-ro Werner Heimlich, 304 Soltau (Han), Bahnmeisterei.

Junio

Unu monaton post la IFEF-kongreso okazos en Aywaille kaj Liège (Belgio) la 6a Internacia Turista Koncentrado de la Fervojistoj (7. - 13. 6.). Lastjare partoprenis ĝin 300 fervojistoj. Ĝi ne estas ekskluzive por esperantistoj. Kostoj: 2150 belgaj frankoj, el kiuj 1000 estas antaŭpagendaj. Aliĝo ĝis 15. 4. per: Secretariat des S. I. Amblere, Internacia Turista Koncentrado de la Fervojistoj, sekretariejo: 33, Avenue Blonden, Liège, Belgio.

Junio ĝis aŭgusto

Nova sistemo de aŭtobusvojaĝo: la karuselvojaĝo je ses diversstempaj rondoj. Ĝi komenciĝas en Amsterdam kaj kondukas tra kvar landoj (Nederlandoj,

Germanio, Luksemburgo kaj Belgio). Germanaj partoprenontoj komencos kaj finos la vojaĝon en Köln aŭ Heidelberg. Kostoj por 11 tagoj: 382 nederlandaj guldenoj. Aliĝu per: Internacia Turisma Centro, Aerodromo Schiphol (konstruaĵo 114, ĉambroj 101, 105 - 107), Nederlando.

Julio

De la 19a ĝis la 26a de julio havos sian lokon en Helsingör la tradiciaj FERIAJ Esperanto-Kursoj de kvin diversaj kategorioj. Kostoj en 3 - 4 persona ĉambro: 210 danaj kronoj. Kontraŭ pluspago de 15 resp. 35 dkr. loĝado en du- resp. unupersona ĉambro ebla. Aliĝo per: s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danlando.

Aŭgusto

La sesan fojon estas okazos ferii en Svislando. Kiel feriloko por la Eŭropa Ferio-semajno (23. - 29. 8.) estas elektita Caslano apud Lugano. Kostoj: 155 svisaj frankoj. Pluspago estas necesa por restado en ĉambro kun malpli ol 8 personoj. Aliĝo ĝis plej malfrue 10. 8. per: s-ro Hans Hunkeler, poŝtfolio 417, Aarau, Svislando.

Oktobro

GEFA havos sian 7an jarkunvenon en Solingen la 17/18-an de oktobro. Notu jam nun tiun daton. Detaloj sekvos.

Julio 1965

Eŭropa Esperanto-Konferenco nomiĝas la feria semajno en Wien antaŭ la UE-kongreso. Ĝi okazos de la 18a ĝis la 24a de julio 1965. Aliĝo per: Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965, organiza komitato, Fünfhausgasse 16, Wien XV, Aŭstrio.

Iama GEFA-prezidanto 65 jarojn aĝa.

La 13an de majo 1964 nia longjara, elstara kunlaborinto kaj eksprezidanto, fervoja konsilisto A. Simon, fariĝos 65 jaraĝa kaj sekve de tio li pensiuniĝos fine de majo. Estas ĝenerala kutimo danki en tia momento al kolegoj, kiuj ne nur estis longjaraj membroj de la asocio, sed ankaŭ kontribuis al la bonfarto de nia fervojista esperantistaro. Ĉi-kaze ni speciale volonte direktas nian dankon

Wir leben im Zeitalter internationaler Kongresse. 1951 genügten noch 715 Kongresse. 1961 waren es bereits 1845. Auch in 1964 wird der 16. IFEF-Kongreß in Brüssel (9. - 15. Mai) nur einer unter Hunderten anderer sein. Für uns Eisenbahner-Esperantisten ist er jedoch die wichtigste internationale Veranstaltung. Dort werden wir erwartet.

Haben Sie sich schon angemeldet?

Das Nähere steht im Organ „La Internacia Fervojisto“.

al nia iama prezidanto, ĉar dum certa tempo li tenis en siaj manoj la plej gravajn fadenojn, tiamaniere kvazaŭ savante la asocion dum tempo, kiam mankis bonvolaj kunlaborantoj. Jam en aŭtuno 1952, kiam nia BULTENO ekaperis, kolego Simon transprenis la oficon de la redaktoro. Post kiam la tiama prezidanto de GEFA, s-ano Pape, estis rezigninta je sia ofico, kolego Simon estis delegito de GEFA en la 5a IFEF-kongreso en Utrecht kaj poste en oktobro 1953 fariĝis prezidanto. Samtempe li estis membro de la Terminara Komitato de IFEF.

Ĝis somero 1954 li donis ĉiujn siajn fortojn por la multflankaj laboradoj, kiuj kuŝis sur liaj ŝultroj. Neniām li laciĝis. Ĉiam li estis ĝentila kaj donis valorajn konsilojn. Ni ankaŭ menciū ĉi tie, ke estis li, kiu por la landaj asocioj fariĝis la metalstandardetojn, kiujn de tiam oni povas vidi sur la tabloj de la delegitoj dum la kongresaj kunsidoj.

En aŭtuno 1954 li devis fordoni ĉiujn oficojn escepte tiun en la Terminara Komitato pro dejora troŝarĝo. Nur en printempo 1956 li ankaŭ ekŝiĝis el la Terminara Komitato. Sed li restis fidela membro, kiu ĉiam estis preta helpi per konsiloj kaj praktika agado se necese.

La GEFA-estraro kaj la tuta asocio deziras al nia kara membro, kunlaborinto kaj amiko longajn jarojn en plej bona sanstato kaj ni ĝojus, se li restus fidela al la asocio kaj se oni povus saluti lin en la jarkunveno.

GEFA-estraro

Triobla revolucio

La angla filozofo Sir Bertrand Russell donis jenan difinon pri nia epoko: Ni estas travivantaj tri revoluciojn: tiun de la junuloj kontraŭ la maljunuloj, tiun de la malriĉuloj kontraŭ la riĉuloj kaj tiun de la frenezuloj kontraŭ homoj kun sana prudento.

Neuer Bezirksbeauftragter

Der bisherige Bezirksbeauftragte für Esperanto im BSW Saarbrücken, Herr BOR Winkelhaus, ist wegen dienstlicher Beanspruchung von diesem Amt zurückgetreten. Auf seinen Vorschlag hat das BSW Saarbrücken Herrn BS Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hgbf als neuen Bezirksbeauftragten bestimmt. Herr Winkelhaus richtete bald nach seiner Versetzung zum AW Saarbrücken-Burbach für die saarländischen Eisenbahner, die damals der DB neu angegliedert wurden, einen Esperanto-Sprachkurs ein, dessen Erfolge bei der Sprachprüfung anlässlich der 4. Jahresversammlung der GEFA in Trier 1961 deutlich wurden. Für seine verdienstvolle Tätigkeit als Bezirksbeauftragter gilt ihm unser aller Dank.

Alois Hauptenthal

Berichtigung

Im BULTENO Nr. 1/64 sind auf Seite 4 unter „Bezirksbeauftragte“ die Herrn BOR Winkelhaus (Saarbrücken) betreffenden Angaben zu streichen und zu ersetzen durch „BS Alois Hauptenthal, Ga Saarbrücken Hgbf, Basa 956/5523“.

Nekrologo

Nur nun atingis nin la informo, ke la 19an de novembro 1963 mortis en Belgrad (Jugoslavio) Stefan V. Stojnić en la aĝo de 80 jaroj. Li estis elstara figuro en la fervojista Esperantomovado.

Naskite en 1887 li esperantistiĝis jam en 1911. Krom lia multflanka okupo kiel terminologia fakulo ĉe la Ĝeneraldirekcio li publikigis multnombrajn artikolojn en „La Fervojisto“, la organo de la Internacia Asocio de la Esperantistoj Fervojistaj (IAEF), kies prezidanto li estis inter la jaroj 1924 - 1927. Li gvidis kursojn, prelegis en seminarioj, eldonis lernolibrojn kaj vortarojn. Jam maljuniginte li ne hezitis prezidi la Esperantosocieton en Pula kaj fariĝi sekretario en Vrŝac. Ĉiuj partoprenintoj al la 9a IFEF-kongreso en Rijeka (1957) bone rememoras, kiam eksprezidanto Stojnić salutis la kongresanojn kun fervoro kaj entuziasmo.

Diversaĵoj

„La „Instituto por Esperanto en Komerc kaj Industrio“ kun la sidejo en Crailsheim publikigis la fondajon skribante en germana lingvo al firmaoj kaj instancoj. Al la letero estas aldonita informilo, kiu entenas la celojn de la fondajo kaj regulas la kontribuojn.

24 paĝa ilustrita broŝuro en Esperanto servas al komercaj celoj. Interesuloj povas peti ĝin senkoste per: La Koopera Federacio, Sekretariejo, Stockholm 15, Svedio.

„Muzilo estas Esperanto en la muzika mondo“ titoliĝas la kajero n-ro 1, kiu enhavas klarigan tekston kaj muzikajn en nova notskribo. Prezo: 3,50 nederlandaj guldenoj. Interesuloj turnu sin al la eldono: MUZILO, Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Dum la venonta delegataro kunveno de la Internacia Fervojista Alkoholkontraŭla Asocio (IEAV) en aprilo kredeble oni pritraktos denove la lingvan problemon. La uzado de Esperanto estis pridiskutita jam unufoje sen rezulto. Kolegoj, kiuj agas sur tiu tereno aŭ havas konatulojn, faru proponojn kaj stimulojn.

Korespondanto kun germanaj fervojistoj deziras:

— s-ro R. A. Prodănescu, Calea Serban Vodă 23, Bukuresti 6, Rumanio

— s-ro Ludwig Haničić, Jelske cesta 21, Zagreb II, Jugoslavio

Trajnoj de la DB pli rapidaj

La Germana Federacia Fervojo altigos entute la nivelon de la rapideco kaj plirapidigos ankaŭ la pasaĝer- kaj vartrajnojn. La projektoj antaŭvidas por eksprestrajnoj rapidecojn ĝis 160 km/h, por akcelaj trajnoj 120 ĝis 140 km/h kaj por ordinaraĵaj pasaĝertrajnoj 100 ĝis 120 km/h. Trans-Europ-Ekspres-vartrajnoj veturas regule jam nuntempe per 100 km/h. Longdistancaĵaj vartrajnoj, kiuj antaŭ malmultaj jaroj veturis nur per 55 km/h, atingas nuntempe 65 km/h kaj veturos ĝis 1970 per 80 km/h. Ĉiuj varvagonoj devos esti ekipataj per rulilaj radakslagroj kaj kompletaj bremsinstalaĵoj. Nuntempe rulas ankoraŭ ĉirkaŭ 40% de la varvagonoj per oleoringaj radakslagroj, 9% disponas pri nur transiraj tuboj por la premaerbremsa, sed ne pri propraj bremsinstalaĵoj. La ŝanĝkonstruo bezonas pojarre proksimume 100 milionojn da markoj.

(Traduk. el „Bundesbahn-Mitteilungen“ de W. B.)

La fervojo eluzas la elektronikon

Sen propra penskapableco solvas la grandkomputiloj kiel obeemaj robotoj la taskojn, kiujn homoj preskribas. Nur kun homa helpo tiuj aparatoj faras mirindajn kalkulojn kun surpriziga rapideco kaj precizeco laŭ zorgeme ellaborita programo. Ankaŭ la fervojo eluzas de kelkaj jaroj tiun novan metodon.

La evoluo de la simpla kalkulado tra la kalkultabulo, la kalkulŝovilo kaj la simpla kalkulmaŝino ĝis la eltrovo de elektronaj grandkomputiloj daŭris kelkajn jarcentojn. La unuaj utiligeblaj komputiloj estis eltrovitaj komence de la 17a jarcento. La usonano Hollerith konstruis en la jaro 1890 la unuan komputilon por trukartoj.

La iama Germana Regna Fervoja Kompanio instaligis unuafaje en la jaro 1924 ĉe ĉiu direkto komputilon por trukartoj. Komence estis prilaborataj la statistikistoj pri la trajna servo (ĉiutage 20000 pasaĝer- kaj 14000 vartrajnoj). Poste la instalaĵoj prilaboris aliajn servojn ekz. la salajrojn por 240000 ofi- cistoj kaj la pensionojn por 300000 eksoficistoj aŭ familianoj.

Tamen pro la limigo ankaŭ tiurilate oni serĉis novajn vojojn ekde 1956. Ili kondukis en 1961 al pruntepreno de grandkomputilo de la firmao IBM. Kiu estas la principo de tia elektrona aparato?

La kalkulelementoj de meĥanika aŭ elektra kalkulmaŝino konsistas ĝenerale el la aro de radetoj ordigitaj laŭ la cifersistemo 0 ĝis 9. La adicio resp. subtraho estas farata per turnado de la radetoj antaŭen aŭ malen. Je la fino de la kalkulado la ciferoj restas starantaj antaŭ fenestro, tra kiu la rezultato povas esti legata.

La kalkulelementoj de elek-

trona komputilo konsistas el relajo, elektronaĵoj aŭ transistoroj. Tie estas nur konstatoble, ĉu en tiuj konstruelementoj fluas kurento aŭ ne. Oni diferencigas nur du statojn nome „ek“ aŭ „mal“, kio konformas al la ciferoj 1 aŭ 0. Per tiuj du ciferoj oni povas demonstri ĉian numeran valoron, se oni uzas la dunombbran sistemon. Tiu sistemo eltrovita de Leibnitz (1646 - 1716) havas kontraŭe al la deknombra sistemo, kiu posedas kiel bazon 10 kaj sekve la ciferojn 0 ĝis 9, kiel bazon 2 kaj sekve ankaŭ nur du ciferojn, 0 kaj 1. En Germanio la unua komputilo kun elektromĥanika relajo estis konstruita en 1944 por militistaj celoj. Samtempe kaj sendepende de tiu invento sukcesis en Usono simila konstruado.

La programisto, nova profesia tipo, fiksas la kompletan laborsinsekvon ĝis la lasta detalo. La komputilo estas nur nekredible rapida kaj diligenta helpaparato de la homo. Ĝi funkcias nur laŭ ordonoj. Propran penskapablecon ĝi ne posedas kaj ne povas demonstri proprajn iniciativojn. Kiel kalkuloboto ĝi solvas nur taskojn, kiujn la programisto estas preskribinta. La ekzakta preparo de unusola laborprogramo povas ampleksi monatojn, ilia solvo okazas dum malmultaj sekundoj en nekredible rapideco kaj kun surpriziga precizeco.

La indikoj ekz. el la frajtleteroj

estas transprenataj sur trukartoj. Kiel konate, la trukartoj entenas nur truojn en ciferitaj linioj. Tiuj signoj estas transprenataj sur magnetbendoj. Unu magnetbendo kapablas transpreni la enhavon de 100000 trukartoj. Sur 1 cm de la bendo povas esti kolektataj ĝis maksimume 220 signoj kaj legataj aŭ surbendigitaj en unu sekundo pli ol 60000 signoj. La magnetbendoj estas longaj 732 m kaj ebligas la surbendigon de 12 milionoj da signoj. Ili estas la esencaj informiloj, el kiuj la grandkomputilo povas legi milojn da signoj en sekundoj. La rezultatoj denove estas transprenataj sur magnetbendoj kaj presataj en lista formo. Rapidpresmaŝinoj povas presigi 36000 liniojn pohore.

Al la temoj, kiujn tiu grandkomputilo jam prilaboras aŭ estonte pritraktos, apartenas la

- komputo de la frajtoj por ĉirkaŭ unu miliono da varvagonoj,
- kalkulo de la rentoj,
- statistikistoj pri la pasaĝer- kaj vartrajnoj,
- administrado de la materialoj.

La Germana Federacia Fervojo spertis de la grandkomputilo jam profundan eluzon de la indikoj sur multaj terenoj. La statistikistoj estas disponeblaj pli frue ol antaŭe. En la varekspedejoj, trafikkontroloj, trukartaj instalaĵoj kaj en ĉiuj instancoj komisiitaj pri la havigo kaj administrado de materialoj estas konstatebla konsiderinda ŝparo je personaro. La luprezo por la instalaĵoj estas pomonate 170000 germanajn markojn.

(Kompl. de W. B.)

Luksa pluspago. Norvega studento estis kaptata, kiam li veturis sur la akso de sveda pasaĝertrajno. Li devis postpagi la veturprezon: 113,50 svedajn kronojn. Tamen li ricevis iom poste ankoraŭ duan fakturon pri 26 kronoj. La konduktoro estis pretervidinta, ke la studento estis kuŝinta sub unuaklasa vagono.
(Traduk. el „Morgenbladet“, Oslo de Rudolf Hönnemann.)

Ni legis en...

DEFA-Bulteno de la Dana Esperantista Fervojista Asocio anoncas multflankan programon por la DEFA-jarkunveno en Kopenhagen (8. 3.)

El Popola Ĉinio dediĉas (en n-ro 1) plurajn paĝojn ilustritajn al la fama pentristo Ki Bajŝi (1863 - 1957).

Esperanto en Skotlando sciopovas humorigi (en n-ro 53) per amuza esperantigita rakonto el familia vivo.

FERVOJISTO, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, donas (en febr.) valorajn informojn pri historio kaj fervojaj instalaĵoj de la kongresurbo Bruselo.

FRANCA ESPERANTISTO okupiĝas (en jan.) pri la problemoj, ĉu la fina sukceso de Esperanto nuligos la bezonon je profesiaj interpretistoj.

INTERLINGVISTIKA INFORMASERVO, eldonita de la Societo por Internacia Lingvo, akcentas ankaŭ (en n-ro 4/63) per objektivaj artikoloj, ke Esperanto bezonas sciencajn esploron. Rimarkinda estas la artikolo „Ĉu Esperanto ne neŭtrala?“

Kongress-Revue betitelt sich die erste Ausgabe einer internationalen Fachzeitschrift für Planung, Durchführung und Technik bei Kongressen, Messen, Tagungen etc. Der Leitartikel befaßt sich mit dem Sinn internationaler Kongresse.

En **Norvega Esperantisto** troviĝas (en n-ro 8/63) raporto pri la lastjara IFEF-kongreso.

NOVA CIVITO, katolika revuo ilustrita, elstarigas (en n-ro 4/63) la ĉefartikolon „Ĉiu virino naskiĝas patrino“.

Paŝon post Paŝo, informilo de la loka grupo en la sveda vilaĝo Svängsta donas (en n-ro 1/2) imitindan ekzemplon, kiamaniere la aktiveco de kelkaj grupanoj kapablas disvastigi la ideon de Esperanto.

En **THE WORKER ESPERANTIST**, eldonita de la brita laboristaro, analizas d-ro Mildwurf (en n-ro 1) la diferencojn en interlingvo. W. B.

Auf Grund von Anfragen geben wir bekannt, daß es jedem Mitglied, das eine Esperanto-Sprachprüfung bestanden hat, freisteht, eine Mitteilung hierüber zu seinen Personalunterlagen nehmen zu lassen.

Aus den Gruppen

Duisburg. La esperantistoj fervojistaj renkontiĝas ĉiun duan sabaton de monato je la 19a h. en la atendejo de la ĉefstacidomo kun la loka „Rondo de l'amikoj de Esperanto.“ Gastoj bonvenaj. Peter Hermanns

Saarbrücken. Der Bestand an Espe-

ranto-Büchern ist mit einigen Originalwerken ergänzt worden. Den Mitgliedern geht in Kürze eine Bücherliste zu. Im Laufe des Jahres sollen Sprachkurse für Anfänger und Fortgeschrittene eingerichtet werden, die im Amtsblatt der BDSaarbrücken bekanntgegeben werden.

Alois Hauptenthal

Malfraua konatiĝo

Anneli kaj Petro ĉiun tagon veturis per la sama trajno al la oficloko. Kiel multaj vojaĝantoj kun monatabiletoj ili havis siajn „devenlokojn“ kaj regule en la tria vagono de antaŭe. Preskaŭ ĉiun matenon ili sidis vid-al-vide. Anneli plaĉis al Petro. Petro plaĉis al Anneli. Ili konatiĝis kaj tamen ne konatiĝis, ĉar Petro estis tro timema por komenci konversacion. Iun tagon aperis la konduktoro por — kiel kutime — kontroli la biletojn. Ĉiuj trajngastoj pretigis tuj la biletojn. Nur Anneli malesperinta komencis serĉi. En la mantelo ŝi ne trovis la bileton. La mansaketo enhavis monujon, kombilon, naztukon kaj puĝdron, sed ne estis en ĝi la veturbileto. „Sed mi ja havis ĝin antaŭe“ vokis Anneli senkonsile.

„Serĉu ankoraŭfoje“ opiniis la konduktoro. Sed la serĉado estis senrezulta. La bileto ne estis trovbla. „Nu“, diris la konduktoro, „nenio helpas. Bedaŭrinde vi devos pluspagi.“ „Sed mi veturas ĉiun tagon per tiu trajno“ diris Anneli, „la juna sinjoro vid-al-vide tute certe konas min kaj scias, ke mi havis monatan bileton“. Tiel rekte alparolita la juna sinjoro ne kapablis rezigni la respondon. „Jes, memkompreneble. Mi konas la fraŭlinon“, li diris, „mi ankaŭ scias, ke ŝi antaŭhierau ĉi tie montris sian bileton.“ „Ĉu vere“, opiniis la konduktoro, „mi volas kredi tion, sed zorgu, ke morgaŭ vi havas la bileton.“

La situacio estis savita. Anneli kaj Petro babilis dum tiu tago en bela maniero, la sekvan tagon des pli bone, kaj la postan dimanĉon ili veturis kune kun dimanĉreveturbileto en la verdajon en kontraŭa direkto. Florantaj arboj, suno, birdkantado, „Happy-End“ sur la tuta linio.

Al la atendema leganto verŝajne du aferoj estis rimarkindaj. Ĉu la konduktoro estas rajtigita — ankaŭ se estis afabla konduktoro — doni al Anneli la permeson vojaĝi sen bileto? Kaj: kiamaniere Anneli envenis la barilon sen rajtigilo?

Nun, en la taŭga momento oni devas iomete helpi al la favoro. Anneli montris al la konduktoro sian bileton, antaŭ ol ŝi eniris la trajnon dirante al li „ne miru, mi petas, se poste mi ne havos bileton“. Aferoj ekzistas jam frue en la mateno, pensis la konduktoro kaj decidis ne miri. Je la fino li tute tute nur miris, kiel prudentaj povas esti virinoj.

Devizo: Ideojn bonkorajn kunvojaĝantoj (kaj konduktorojn) oni devas havi.

(Traduk. el „Rad und Schiene“ de E. Kruse)

Der Kluge ESPERANTO wählt
als Sprache der modernen Welt.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6 Frankfurt (Main) 9, Karlstr. 4-6. Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 625 Limburg/Lahn. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.